

# I

## *La Viro Sen Oreloj*

**E**kde la mateno mi estis pasinta dece sufiĉan distancon. Nun mi sentis iomete lacigita, kaj ĝenata de la fortaj briloj de la suno, kiu estis alte en la zenito. Tial mi decidis halti pro resti kaj fari mian tagmezan manĝadon. La prerio vastiĝis, formante unu terondon flanke de alia kiel senlima ebenaĵo. Ekde nia societo estis disigita antaŭ kvin tagoj de trupo de Ogelaloj, mi estis trovinta nek menciindan beston nek la spuron de homo, kaj nun mi komencis sopiri al intelekta kreaĵo, je kiu mi povis pruvi, ke mi ne estis perdinta mian lingvokapablon per la longe daŭrinta silentado.

Rivereto aŭ alia akvujo ne tieis, arbaro aŭ arbedaro same ne. Mi do ne devis longe elekti, kaj povis halti, ajn kie mi volis. Do mi salte deĉevaliĝis en onda valo sur la teron, metis katenojn ĉirkaŭ la kruoj de mia mustango, deprenis la kovrotukon de ĝi kaj iris supren laŭ la malkruta altaĵo pro resti tie. La ĉevalo devis resti malsupre, proke ĝi ne estis vidata dum proksimiĝo de malamiko. Sed mi mem devis elekti la altan punkton pro povi libere vidi ĉirkaŭen, dum ne estis facile eble vidi min, kiam mi kuŝiĝis sur la teron.

Mi havis bonajn kaŭzojn esti gardiĝe. Ni estis ekirintaj en grupo da dek du viroj de la bordo de la Platte pro iri malsupren al Teksaso en la orienton de la roka montaro. Je la sama tempo la diversaj triboj de la Suoj estis forlasintaj iliajn resteajn vilaĝojn, ĉar kelkaj el iliaj militistoj estis mortigitaj de blankuloj, kaj ili nun volis venĝiĝi. Ni sciis tion, sed, malgraŭ ĉia gardiĝo, tamen iĝis sub ilian forton, kaj estis dispelitaj post forta, sangopostula interbatalo, dum kiu kvin el ni perdis iliajn vivojn, en ĉiujn direktojn sur la prerion.

Ĉar la *indsman*:oj certe ekkonis per mia spuro, kiun mi ne povis tute forviŝi, ke mi rajdis suden, estis supozenda certece, ke ili sekvis min. Do gravis esti ade atenteme, se mi ne volis fari la sperton volviĝi unu vesperon en la kovrotukon, kaj vekigi tiam la nekstan matenon sen skalpo en la Ĉiamaj Ĉasejoj.

Mi kuŝiĝis, elpoŝiĝis pecon da sekigita bubalviando, frotis, pro manko da salo, iomete da pulvo sur ĝin, kaj provis igi ĝin en staton kiu ebligis al mi igi la ledece malmolan aĵon en la stomakon. Tiam mi prenis unu el miaj ‚memfaritaj‘ cigaroj, bruligis ĝin, kaj elblovis fumfigurojn per plezuro, kvazaŭ mi estus virginuja plantisto kaj fumus la per glaceaj gantoj eltiritajn kernfoliojn de la plej bona *goosefoot*.

Mi ne jam estis longe kuŝinta sur mia kovrotuko, kiam mi foje, sen ia intenco vidis malantaŭ min, kaj ekkonis punkton je la horizonto, kiu moviĝis al mi en akra angulo al mia laŭirinta direkto. Mi forrampis tiel malsupren de la altaĵo, ke mia korpo estis tute kovrata de ĝi kaj rigardis la aĵon, en kiu mi iom post iom ekkonis rajdanton, kiu pendiĝis for antaŭen sur la ĉevalo, laŭ la maniero de la indianoj.

Kiam mi estis ekrimarkinta lin, li estis ĉirkaŭ unu kaj duonan anglan mejlon for de mi. Lia ĉevalo iris en tia promena paŝado, ke daŭris preskaŭ duonan horon, ĝis ĝi pasigis unu mejlon. Refoje vidante al la direkto, el kiu li venis, mi ekkonis kvar punktojn plu, kiuj rajdis ekzakte laŭ lia spuro. Tio nun des pli atentigis min. La unuopa rajdanto estis blankulo, kion mi nun rimarkis certige per la vestaĵoj. Ĉu la aliaj eble estis indianoj, kiuj persekutis lin? Mi elpoŝigis mian teleskopon. Ĝuste, mi ne estis erarinta. Ili proksimiĝis, kaj tra la vidilo mi ekkonis klare per iliaj armiloj kaj ŝminkokoloro, ke ili apartenis al la ogelaloj, la plej militema kaj plej kruela tribo de la suoj. Ili havis tre bonajn ĉevalojn, dum la ĉevalo de la blankulo ŝajnis esti sufiĉe malbona rajdobesto.

La rajdanto havis malaltan, maldikan figuron, kaj sur la kapo li havis malnovan feltoĉapelon sen rando, fakto, kiu ne malnormas sur la prerio, sed tiu ĉi emfazis mankon, kiu nun tiamaniere montriĝis al mi pli klare: fakte la viro ne havis orelojn. La lokoj, kie ili laŭnorme devis esti, havis la postsignojn de perforta traktado. Ĉiukaze oni detranĉis ilin de li. De liaj ŝultroj pendis grandega kovrotuko, kiu plene ĉirkaŭis la supran korpon kaj apenaŭ videbligis la maldikegajn kruojn, kiuj estis en tiel stranga paro da botoj, ke oni estus ridantaj pri ili en eŭropo. Ili fakte estis de tiu speco, kiun la *gaucho*:j en sudameriko kutime faras kaj surmetas. Oni deprenas la haŭton de senhufigita ĉevalkruo, enmetas la propran kruron, dum ĝi ankoraŭ varmas, kaj lasas ĝin malvarmiĝi ĉirkaŭ ĝi. La haŭto malvastiĝas tiel dense sur la piedo kaj la kruo, kaj tiel estiĝas bonega piedvesto, kiu sed ankaŭ havas la proprecon, ke oni iras sur la propraj plandoj. De la selo de la nekonato pendis aĵo, kiu certe devus esti pafilo, sed plie similis al ligna batilo, kian oni ĵus trovis en la arbaro. Lia ĉevalo estis maljuna kamelkrura ĉevalino, kiu havis tute neniujn kolharojn. Ĝia kapo estis eksternorme granda, kaj la oreloj havis longecon, pri kiu oni povis ektimiĝi. La besto aspektis, kvazaŭ ĝi estis kunmetita el diversaj korpopartoj de ĉevalo, azeno kaj dromedaro. Dum la irado ĝi tenis sian kapon mallevigite profunden al la tero, kaj dum tio lasis la orelojn peze pendi de la kapo kiel novfundlandana hundo, kvazaŭ ili estus tro pezaj por ĝi.

En aliaj cirkonstancoj aŭ kiel novulo oni certe estus devinta ridi pri rajdanto kaj ĉevalo, sed la viro al mi, malgraŭ lia stranga ekstero, aspektis al mi kiel unu el tiaj okcidentuloj, kun kiuj oni unue devis konatiĝi pro prave taksi ilian valoron. Verŝajne li ne sciis, ke kvar el la plej teruraj malamikoj de la preriĉasisto estis tiel proksime al li, alikaze li ne estus rajdinta tiel malrapide kaj senzorge, aŭ almenaŭ estus reenvidinta al ili de tempo al tempo.

Li nun estis proksimiĝinta al mi je cent paŝoj, kaj atinginta mian spuron. Kiu rimarkis ĝin unue, ĉu la rajdanto aŭ la besto, tion mi ne povis ekkoni, sed mi vidis klare, ke la ĉevalino ekhaltis per si mem, mallevis la kapon eĉ pli profunde ol antaŭe al la tero, direktigis siajn okulojn al la premsignoj de mia mustango, kaj vigle skuis siajn longajn orelojn dum tio, kiuj flugis supren malsupren kaj falis foje antaŭ, foje malantaŭ sur la kapon, tiel ke ĝi aspektis, kvazaŭ ili estis turnigitaj el la kapo de nevidebla mano. La rajdanto volis deĉevaliĝi pro detale ekzameni la spuron. Dum tio li ne necese estus perdinta valoran tempon, kaj tial mi nenecesigis tion per mia voko.

„*Halloo*, viro! Restu sur la ĉevalo kaj alvenu iom pli proksime!“

Mi estis ŝanĝinta mian pozicion tiel, ke li povis vidi min. Lia ĉevalino tuj levis la kapon, antaŭenigis siajn orelojn, kvazaŭ ĝi volis kapti mian vokon kiel pilkon, kaj dum tio vigle svingis la mallongan, nudan vostotrunkon.

„*Halloo, Sir*“, li respondis, „nekstan fojon gardiĝu pri Via voĉo kaj vokegu iom pli mallaŭte! Sur tiu olda herbaro oni neniam scias, ĉu ne tie aŭ aliloke estas oreloj, kiuj ne bezonas aŭdi ion. Venu, Tony!“

La ĉevalino ekmovigis per tiu postulo siajn ŝajne senfinajn krurojn kaj tiam haltis per si mem flanke de mia mustango, al kiu ĝi turnis, post aroganta kaj moka vido, tiun parton de sia korpo, kiun oni je ŝipo kutime nomas la pobo. Ĝi verŝajne estis unu el tiaj rajdobestoj — sur la prerio ne maloftaĵo — kiu vivis nur pro sia mastro, sed kondukas tiel obstine kontraŭ ĉiu alia, ke ĝi neuzebblas al iu alia.

„M’scias ekzakte, kiel laŭte mi rajtas paroli!“ mi sciigis lin. „De kie Vi venas, kaj kien Vi volas, *Sir*?“

„Tio pro la diablo tute ne estas Via afero!“ li respondis.

„Ĉu Vi opinias tion? Supermezure ĝentile Vi ja ne estas. Tiun ateston mi ja povas fari jam nun al Vi kun bona konscienco, kvankam mi nun nur estis parolinta malmultajn vortojn kun Vi. Sed mi volas sincere konfesi al Vi, ke mi kutimiĝis ricevi respondojn, kiam mi demandas.“

„Hm, jes. Vi tutcerte ŝajnas al mi esti eleganta *gentleman*“, li diris dum neestima vido al mi. „Tial mi tuj volas doni al Vi la postulitan informon!“ Li mansvingis reen kaj tiam antaŭen. „Mi venas de tie, kaj volas iri tien.“

La viro komencis plaĉi al mi. Certe li pensis min esti de sia societo perdita nudimanĉa ĉasisto. La vera okzidentulo tute ne atentigas pri sia aspekto, kaj havas malkaŝan malestimon pri ĉia dececo. Aĵn kiu jarlonge migradas en la Sovaĝa Okzidentulo, ne taŭgas por civilizaciaj societoj per sia aspekto, kaj supozas ĉiun, kiu teniĝas pure, esti *greenhorn*, pri kiu nenio bona ekspekteblas. Mi estis ekipinta min supre en la Fort Randall per novaj vestaĵoj, kaj de ĉiam estis kutimiĝinta teni miajn armilojn brilpure, du faktoj, kiuj ne taŭgis pro ŝajni plenalore al la pritakso de savanmigristo. Tial mi ne pensis malbone pri la bruska konduto de la fremda vireto, kaj nun same kiel li montris antaŭen.

„Do eku, ke Vi iros ,tien‘! Sed gardiĝu antaŭ la kvar *indsmen*:oj, kiuj sekvas Vin laŭ Via spuro! Ŝajne Vi ja tute ne jam rimarkis ilin, ĉu?“

La maldikulo vidis al mi per vido de siaj helaj, akraj okuloj, en kiuj videbliĝis miriĝo kaj amuziteco samtempe.

„Ĉu ne jam rimarkis? Hihihih! Kvar *indsman*:oj malantaŭ mi, kaj mi ne rimarku ilin! Vi ŝajnas al mi ekzemple strangulo! La bonaj viroj estas malantaŭ mi jam de la frua mateno. Sed mi tute ne bezonas vidi reen al ili, ĉar oni ja konas la kutimojn de tiuj ruĝaj *gentleman*:oj. Ili teniĝos en deca distanco dum ankoraŭ estas tago, kaj nur kaŝiros al mi, kiam mi estis elektinta restejon ajn ie. Sed ili ekzemple treege miskalkulas, ĉar mi rajdos laŭ ringo, kiu igos min malantaŭ ilin. M'nur ne jam estis en taŭga tereno. Tie ĉi inter tiuj ondajaroj mi finfine povas fari tion, kaj se Vi volas vidi kaj lerni, kiel malnova okcidentulo aranĝas iĝi al la *redman*:oj, Vi bezonas atendi tie ĉi nur ĉirkaŭ dek minutojn. Sed certe Vi lasos tion, ĉar viro de Via speco ekzemple certe havas sufiĉe malpli da emo enspiri nazplenon da indianaodoro! *Come on, Tony!*“

Sen plie atentiĝi pri mi, li forrajdis, kaj jam estis malaperinta duonan minuton poste kun sia stranga ĉevalino inter la teraltaĵoj.

Lia plano estis kompreneble al mi, ĉar mi en lia situacio estus aginta per simila intenco. Li volis rajdi laŭ granda arko, kiu igis lin malantaŭ siajn sekvantojn. Pro tio li devis proksimiĝi al ili, jam antaŭ ili povis rimarki lian intencon per la ŝanĝita direkto. Pro sukceso fari tion, li devis teniĝi nur en la ondaj valoj, sed pli bone estus farinta la arkon tiel mallonge, ke ili devis iri preter li. Ĝis nun ili povis klare rigardi lin, do ili sciis, en kiu distanco li estis antaŭ ili, kaj nun ili ne povis supozi, ke li reestis proksime al ili.

Estis kvar kontraŭ unu, kaj estis eble, ke mi estus estonta en la cirkonstanco, en kiu mi devis uzi miajn armilojn. Tial mi kontrolis ilin, kaj poste atendis la okaziĝojn.

La indianoj proksimiĝis, laŭvice unu post la alia. Ili preskaŭ estis atingintaj la lokon, kie la spuro de la malgrandulo kuniĝis kun mia, kiam la antaŭulo ekhaltis sian ĉevalon kaj turniĝis reen. Ja ŝajnis esti strange al ili, ke la blankulo, kiun ili sekvis, nun ne plu estis videbla. Ili mallonge interkonsilis, dum kiu ili dense kuniĝis. En kazo de danĝero mi jam estus povinta atingi ilin per kuglo de mia ursmortigilo. Sed tio ne necesis, ĉar nun krakis pafo, kaj jam en la neksta sekundo dua. Du indianoj falis de iliaj ĉevaloj, kaj je la sama tempo eksonis laŭta, triumfa voko.

„O—hi—hi—hiiii!“ eksonis tiu guturalo, kiu estas la batalvoko de la indianoj.

Sed ne indiano aŭdebligis ĝin, sed la malgranda ĉasisto, kiu ekaperis de proksima bazo inter du altaĵoj. Li estis aginta laŭ sia plano, estis malaperinta malantaŭ mi, kaj nun revideblis antaŭ mi. Li agis, kvazaŭ li nun volis fuĝi post liaj du pafoj. Lia ĉevalino nun ŝajnis esti tute alia kreaĵo. Ĝi fortege elstreĉis la krurojn, la kapo kun la vigle starigintaj oreloj estis alte super la nuko, kaj ĉiu tendeno, ĉiu fibro ŝajnis klopodiĝi. Rajdanto kaj ĉevalo estis kvazaŭ kunkreskitaj. La viro svingis sian pafilon kaj ŝarĝis ĝin dum la galopado per certeco, kiu konkludigis, ke li ne estis en tia situacio la unuan fojon.

Malantaŭ li krakis du pafoj. La du nelezitaj indianoj estis lanĉintaj iliajn pafilojn al li, sed neniu kuglo trafis lin. La *indsman*:oj elpuŝis kolerkriadon, ekprenis la tomahokojn kaj rajdegis malantaŭ li. Ĝis tiam li ne jam estis vidinta reen. Sed nun li estis finiginta la ŝarĝadon kaj ŝire turniĝis la ĉevalon. Estis, kvazaŭ la besto komprenis ĉiujn pensojn de ĝia rajdanto. Ĝi ekhaltis, elstreĉiĝis, kaj tiam staris senmove kiel segostablo. La rajdanto levis la pafilon kaj mallonge celis. En la nekstaj momentoj ekfulmis dufoje, sen ke la ĉevalino nur ekremetis — klare videble la du *indsman*:oj estis trafitaj tra la kapoj.

Ĝis tiam mi estis kuŝinta celante, sed ne lanĉinta, ĉar la malgrandulo ne bezonis mian helpon. Nun li estis deĉevaliĝinta pro ekzameni la du mortulojn, kaj mi iris renkonte al li.

„Nu *Sir*, ĉu Vi nun ekzemple scias, kiel oni faras arkon ĉirkaŭ tiuj ruĝaj fiuloj, ha?“ li demandis min.

„*Thank you, Sir!* Mi vidas, ke oni povas lerni ion de Vi!“

Mia rideto certe ŝajnis al li iom dusence. Li akre vidis al mi, kaj tiam diris:

„Aŭ ĉu Vi estus havinta similan ideon?“

„Arko ne vere necesis“, mi deklaris. „En tiu tereno, kie oni povas nevidebliĝi en la ondaj valoj, necesas montriĝi al la malamiko en fora distanco, kaj tiam simple rajdi reen laŭ la propra spuro. La arko plie uzindas sur la ebena kaj libera prerio.“

„Nu vidu, mi miras, de kie Vi volas scii ĉi ĉion! Kiu estas Via profesio, ha?“

„Mi skribas librojn.“

„Vi — skribas — librojn — ĉu?“ Mirigite li faris paŝon reen, kaj videbligis duone pripensantan, duone kompatan mienon. „Ĉu Vi malsanas, *Sir*?“

La senorela rajdanto dum tio montris al sia frunto, tiel ke mi povis scii ekzakte, al kiu malsaneco li celis.

„Ne!“ mi kontraŭis.

„Ĉu ne? Do eble urso povas kompreni Vin, sed ne mi! Mi mortpafas bubalon, ĉar mi manĝu. Sed per kiu kaŭzo Vi do skribas Viajn librojn?“

„Pro ke ili estas legataj.“

„*Sir*, ne pensu malbone pri mi, sed tio ja estas la plej granda stultaĵo, kiu elpenseblas! Ajn kiu volas legi librojn, tiu skribu ilin por si mem, tion ekzemple ĉiu infano klare vidu. Sed mi ja ankaŭ ne ĉasas mian viandon por aliaj! Do, hm, ja Vi estas *book-maker*, ĉu? Sed kial Vi tiam venas sur la savanon, ha? Ĉu Vi volas ekzemple skribi librojn tie ĉi?“

„Tion mi nur faros, kiam mi reestos hejme. Tiam mi rakontos ĉion, kion mi spertis kaj vidis, kaj multaj miloj da homoj legos tion kaj tiam scios, kiel la vivo estas sur la savano, senke necesos al ili iri sur la prerion mem.“

„Do Vi boneble ankaŭ rakontos pri mi, ĉu?“

„Memkompreneble!“

Li faris kroman paŝon reen. Tiam li forte proksimiĝis al mi, kaj metis la dekstran manon al la tenilo de sia *bowie*-tranĉilo, la dekstra ekprenis mian brakon.

„*Sir*, jen staras Via ĉevalo! Sidiĝu sur ĝin kaj igu, ke Vi foriĝas, se Vi ne volas, ke kelkaj koloroj da malvarma akra fero rampiĝas inter Viajn ripojn! Dum Via ĉeesto oni ja ne povas paroli unu vorton kaj ne movi brakon, senke la tuta mondo ĝin ekscios. Ajn iu aŭ la alia Vin prenu! Eku kaj foriru de tie ĉi!“

La malgranda viro estis tiel alte, ke li apenaŭ atingis mian ŝultron, sed tamen li tute seriozis per sia minaco. Tio amuzis min, senke mi lasis rimarki tion.

„Mi promesas nur skribi bonaĵojn pri Vi“, mi moderiĝis.

„Vi iru! Mi ĝin diris, kaj tiel ĝi okazu!“

„Do mi ĵuras al Vi, ke mi skribos pri Vi tute ne.“

„Ne valoras! Ajn kiu sidiĝas pro fari librojn por aliaj, tiu frenezas, kaj frenezulo neniam plenumigos sian ĵuron. Do antaŭen, *mann*, alikaze la kolera galo ekzemple fluos en miajn fingrojn, kaj mi faros ion, kio ne agrablos al Vi!“

„Kio nu povus esti tio?“

„Tion Vi tuj vidus!“

Ridetante mi vidis en liajn kolere brilantajn okulojn.

„Nu, do vidigu!“

„Jen, vidu! Kiel Vi ŝatas tiun tranĉilon?“

„Ne malbone. Tion mi pruvos al Vi!“

Tuj mi estis preninta lin, ŝiris liajn brakojn malantaŭen, trametis mian maldekstran brakon inter ilin kaj lian dorson, premis ilin forte al mi, kaj tiam metis mian dekstran manon tiel forte ĉirkaŭ lia manartiko, ke li lasis la tranĉilon kun voko de doloro. Tiu neekspektita atako surprizis la viron tiel, ke la rimeno de sia kuglosako katenis siajn manojn sur lia dorso, jam antaŭ li estis ekfarinta ian movon de defendiĝo.

„*Damn it!*“ li vokis. „Kion Vi faras? Kion Vi volas ekzemple fari al mi?“

„*Halloo, Sir*, gardu Vian voĉon kaj vokegu iom pli mallaŭte!“ mi respondis al li per liaj propraj antaŭaj vortoj. „Sur tiu olda herbaro oni scias neniam, ĉu estas oreloj ie aŭ tie, kiuj ne bezonas aŭdi ion.“

Mi lasis lin, kaj tiam ekprenis per rapida movo la tranĉilon kaj la pafilon, kiujn li estis demetinta dum la ekzameno de la mortuloj. Li provis deŝiri la manojn. La klopodo fluigis la sangon en lian kapon, sed li ne sukcesis. La rimeno estis tro fikse.

„Paciencon, *Sir*. Vi malgraŭ ĉio nur estos libere, kiam mi volas tion!“ mi konsilis al li. „Mi fakte nur volas pruvi al Vi, ke *book-maker* estas kutimiĝinta paroli tiel al la homoj, kiel ili parolas al li. Vi ekprenis la tranĉilon kontraŭ mi, sen ke mi ofendis Vin aŭ iel alie damaĝis al Vi, kaj nun Vi estas sub mia forto laŭ la leĝoj de la savano. Mi povas fari kun Vi ajn kion mi volas. Neniu homo rajtas kontraŭi al mi, se mi nun intencus, ke tiu malvarma akra fero rampiĝos inter Viajn ripojn, anstataŭ inter miajn, kiel Vi ĝin volis antaŭe.“

„Ekpuŝu, *mann!*“ li respondis sinistre. „Estas tute laŭ mia konsento kiam Vi neigas min, ĉar la malhonoro, esti venkata kaj katenata de unu sola kontraŭulo vidalvide kaj meze dum hela tago, tiun Sans-ear ne volas travivi.“

„Ĉu Sans-ear? Vi estas Sans-ear, ĉu?“ mi vokis.

Mi estis aŭdinta multon pri tiu fama okzidentulo, kiun oni trovis nur malofte kune kun alia, ĉar li supozis preskaŭ neniun esti sufiĉe digne alliĝi al si. Antaŭ multaj jaroj li estis perdinta siajn orelojn ĉe la Navaĥoj, kaj tial havis sian strangemaniere el du lingvoj kunmetitan nomon ‚Senorelo‘, per kiu li famis ĉie sur la savanoj, kaj ankaŭ ekster ĝiaj limoj.

Sans-ear silentis post mia demando, kaj nur, kiam mi ripetis ĝin, li diris:

„Mia nomo ne estas Via afero! Se mi havas malbonan, ĝi ne valoras esti dirata, kaj se mi havas bonan, ĝi meritas, ke mi fortenu ĝin de la malhonoro de la momento.“

Mi paŝis al li kaj lozigis liajn katenojn.

„Jen Vi havas Vian tranĉilon kaj Vian pafilon; Vi estas libera! Iru, ajn kien Vi volas!“

„Ne faru malbonan ŝercon!“ li grumblis. „Ĉu mi povas lasi la malhonoron tie ĉi, esti venkita de *greenhorn*? Se estus estinta deca ulo kiel la ruĝa Winnetou aŭ eĉ skolto kiel Old Firehand aŭ Old Shatterhand, nu tiukaze —“

Mi kompatis pri la maljunulo. Mia petolaĵo vere estis tuŝinta lian koron, kaj karis al mi, ke mi povis konsoli lin, ĉar li ja ĵus estis menciinta la nomon mem, per kiu mi estis famiĝinta ĉe la restejoj kaj de la blankuloj kaj en la *wigwam*:oj de la indianoj.

„Ĉu *greenhorn*?“ mi demandis. „Ĉu Vi vere kredas, ke novulo kapablas fari tian petolaĵon al la brava Sans-ear?“

„Kio alia Vi estas? Vi ja aspektas, kvazaŭ Vi ĵus venis el tajlora butikoj, kaj Viaj armiloj estas purigitaj tiel bele blanke, kvazaŭ ili estis pretigitaj por maskobalo!“

„Sed ili bonas; tion Vi vidu! Atentu!“

Mi prenis lozan ŝtonon en la duobla grandeco de dolara monero de la tero, ĵetis lin alten en la aeron, alŝultrigis la pafilon, kaj ĵus en la momento, kiam la fortoj de la ĵeto kaj la tera gravito lasis ĝin atingi la plej altan punkton, tiel ke ĝi ŝajnis ŝvebi senmove en la aero, mia kuglo trafis ĝin, kaj pelis ĝin ankoraŭ pli alten.

Mi estis provinta tiun pafon pro ekzercado antaŭe jam sennombrajn fojojn, antaŭ mi kapablis ĝin. Estis artaĵo, kiu perpleksigas la spektanton. Nun ankaŭ la malgrandulo vidis al mi per paro da okuloj, en kiu mi kredis ekkoni preskaŭ la esprimon de konsterneto.

„Heavens, kia pafado estis tiu! Ĉu ĝi ĉiam sukcesas?“

„Dek naŭ po dudek fojojn.“

„Tiukaze Vi estas iu, kian oni devas serĉi! Kiu estas ekzemple Via nomo?“

„Old Shatterhand.“

„Neeble! Old Shatterhand estu multe pli maljuna ol Vi, alikaze oni ja ne nomus lin la *old a smeŝmano*.“

„Vi forgesas, ke la vorto *old* estas tre ofte uzata en alia senco kiel nur pro esprimigi maljunecon.“

„Ĝuste! Sed, hm, ne pensu malbone pri mi, *Sir*: Old Shatterhand ricevis pikon de Winnetou en la kolon, kiu —“

„Vidu jen — jen la cikatro!“

„Verece! Jen ĝi! — Kaj — Old Shatterhand laŭdire ĉiam kunhavas du pafilojn, ursmortigilon kaj multkuglan pafilon.“

„Jen ili!“

„*Behold*, do Vi sed jes estas Old Shatterhand! Hm, mi nun volas diri ion al Vi: ĉu Vi kredas, ke mi estas ekzemple teruriga stultulo?“

„Ne, tion mi ne kredas. Vi ja nur faris la eraron pensi, ke mi estus *greenhorn*, nenion plu. De senspertulo Vi ne povis ekspekti tian atakon. Sans-ear estas nur venkebla per surprizo.“

„Ho ho! Laŭŝajne necesas je Vi tute nenia surprizo. Certe estas nur malmultaj viroj, kiuj posedas Vian bubalan forton. Esti subigata de Vi ne estas malhonoro. Ni do volas amikiĝi! Mia vera nomo estas Mark Jorrocks, kaj se Vi volas fari komplezon al mi, nomu min Mark!“

„Kaj Vi nomu min Charley, kiel ĉiuj miaj amikoj. Jen mia mano.“

„Konsentite, tiel ĝi estu, *Sir!* La maljuna Mark ne estas viro, kiu ne emas tuj skui la fingraron de ajn ĉiu. Sed Vian manon mi ekprenas ĵus rekte. Sed, mi petas Vin, indulgiĝu, ke Vi ne preme faros pudingon el mia mano! Mi bezonas ĝin poste!“

„Ne timu, Mark! Tiu mano ja ankoraŭ faru kelkajn komplezojn al mi, same kiel mia estas preta servi al Vi. Sed nun mi certe rajtas denove elparoli mian unuan demandon duan fojon: De kie Vi venas, kaj kien Vi iras?“

„Mi venas malsupren el la direkto de Kanado, kie mi estis en societo de *lumberjack*:oj, kaj nun mi ekzemple volas iri al Texas kaj Meksikujo, kie laŭdire estas tiom da fiuloj, ke la koro ekplezuriĝas per la penso pri la kugloj kaj tranĉilaj piko, kiujn oni devas ekspekti tie.“

„Tiu ja tute estas mia vojo! Ankaŭ mi volas iri al Texas kaj Kalifornio, kaj dum tio povas esti tute egale al mi, ĉu mi iras laŭ eta flankvojo tra Meksikujo. Ĉu mi rajtas kuniri?“

„Ĉu Vi rajtas! Tutcerte! Vi jam estis tie malsupre en la sudo, kiel mi aŭdis, kaj tial Vi ĵus estas la viro, kiun mi bezonas. Sed nun diru serioze al mi: Ĉu Vi vere skribas librojn?“

„Jes.“

„Hm! Kiam Old Shatterhand diras tion, ĝi ja devas esti alie, kiel mi pensis pri tio. Sed mi certigas al Vi, pli ŝate mi volus neekzamenite kaj kun la dorso antaŭe iri en ursan kavon, ol puŝi plumon en inkon. Dum mia tuta vivo mi ne sukcesus skribi la unuan vorton. Sed nun klarigu al mi, kiel la *indsmen*:oj venis en tiun ĉi regionon! Estis ogelaloj, antaŭ kiuj oni ja certe gardiĝu. Sed ĝenerale tiuj fiuloj ja serĉendas multe pli fore en la nordo.“

Mi rakontis al li, kion mi sciis.

„Hm!“ li tiam diris. „Do certe estas konsilinda ne ekradiki tie ĉi. Hieraŭ mi trovis spuron, kiu estis ne neglektinda. Mi nombris almenaŭ sesdek ĉevalojn. Tiuj kvar ruĝuloj tie ĉi certe apartenis al la trupo, kaj boneble estis elsenditaj pro esplorado. Ĉu Vi estis tie ĉi antaŭe?“

„Ne.“

„La *indsmen*:oj supozeble troviĝas ĉirkaŭ tridek mejlojn okcidente de ni. Ni iĝu de ilia vojo kaj pli bone direktiĝu suden, kvankam ni tiel trovos akvon nur morgaŭ. Kiam ni baldaŭ ekrajdos, ni jam hodiaŭ antaŭ la nokto atingos la fervojon, kiun oni konstruis de la ŝtatoj al la okcidentaj landoj, kaj se ni trafos ĵus la ĝustan tempon, ni povos fari la plezuron al ni vidi trajnon, kiu ekzemple veturos preter ni.“

„Mi pretas ekrajdi. Sed kion ni faru kun la kvar mortuloj?“

„Kion ni faru? Ne multe. Ni lasas ilin kuŝi tie ĉi. Sed antaŭe mi volas depreni iliajn orelojn.“

„Ni enterigu ilin, ĉar se oni trovos ilin, nia ĉeesto estos malkovrata.“

„Ili trovu ilin, Charley; ĵus tio estas kion mi volas.“

Sans-ear portis la mortajn indianojn sur la pinton de altaĵo, detranĉis iliajn orelojn kaj metis tiujn en iliajn manojn.

„Nu, Charley! Oni trovos ilin, kaj samtempe ekscios, ke Sans-ear estis tie ĉi. Mi diras al Vi, estas tute naŭze sento, kiam dumvintre oni volas frosti je la oreloj, sed ne plu havas ilin. Iam mi estis tiel mallerte lasi min kapti de la ruĝuloj. Mi estis mortigintaj plurajn el ili, sed debatis nur la orelon de unu, anstataŭ trafi lin ĝuste per la tomahoko. Tial ili pro mokado detranĉis miajn orelojn, antaŭ ili volis komenci neigi mian vivon. La orelojn ili havas, sed ne mian vivon, ĉar Mark neekspektite kaŝe foriĝis. Sed pro miaj du oreloj — nu — jen nombru!“ Li deprenis sian pafilon de la dorso, kaj montris al mi la multnombrajn entranĉaĵojn kiujn li estis farinta. „Ĉiu entranĉaĵo reprezentas la ekmorton de kontraŭula *indsman*. Hodiaŭ aliĝos kvar novaj.“

Li faris la kvar entranĉojn, kaj tiam pluis:

„Tiuj ĉiuj estis ruĝuloj. Sed tie ĉi supre estas ok entranĉaĵoj por blankuloj, kiuj gustumis miajn kuglojn. Kial, tion mi rakontos al Vi iam pli poste. Mi ankoraŭ pluserĉu nur du, patron kaj filon, la plej eminentaj fiuloj, kiuj povas ekzisti sur la vasta tero de Dio. Kiam mi estos trovinta tiujn du, mia verko estos farita.“

Liaj okuloj subite brilis humide, kaj sur lia tanita vizaĝo aperetis trajto de melankolio kaj kortuŝo kaj malforteco. Mi antaŭsentis, ke la koro de la maljuna ĉasisto iam antaŭe estis efikiginta siajn rajtojn. Eble la doloro aŭ la venĝo estis ĵetinta ankaŭ lin, same kiel multajn aliajn, en la brakojn de la kruda vivo en la sovaĝejo; ĉar la vera pericĉasisto ne plu scias iom pri la ordono: Amu viajn malamikojn!

Mark estis reŝarĝinta sian pafilon. Ĝi estis unu el tiuj strangaj pafilaĉoj, kiujn oni trovis ne malofte sur la prerio: la tigo ne plu havas sian eksan originan formon. Estis entranĉaĵo flanke de entranĉaĵo, fendeto flanke de fendeto. Ĉiu unuopa de tiuj signifajoj memorigis pri ekmorto de kontraŭulo. La tubo estis kovrita de dika rusto, kaj ŝajnas kurbetiĝinta. Neniu fremdulo povis kapabli fari sufiĉe taŭgan pafon per ĝi. Sed en la mano de la posedanto, tia pafilo estis neniam mistrafanta. Dum tuta vivotempo li kutimiĝis al ĝi, konis ĉiujn ĝiajn avantaĝojn, ĉiujn misfunkciojn kaj fuŝiĝojn, kaj kiam li puŝis kuglon malsupren sur la pulvron, li estus vetanta pri vivo kaj feliĉo, ke ĝi atingis la celon.

„Tony!“ la malgrandulo vokis.

La ĉevalino ĝis nun estis paŝtiĝinta en la proksimo. Per lia voko ĝi nun alvenis salte, kaj stariĝis tiel prete flanke de li, ke li nur bezonis levi la brakon pro sursvingiĝi.

„Mark, jen Vi havas bonegan ĉevalon! Ajn kiu vidas ĝin la unuan fojon, ne ofertus unu dolaron por ĝi. Sed kiu rigardas ĝin pli detale, tiu baldaŭ rimarkas, ke Vi ne vendos ĝin por kvincent dolaroj.“

„Ĉu kvincent? *Pshaw!* Diru mil! Tie supre en la rokmontaro mi konas lokojn, kie mi povus elpreni la oron per buŝelo, kaj kiam mi renkontas iun, kiu meritas, ke Mark Jorrockas amas lin elkore, mi montros tiujn *placer*-ojn al li. Mi do ne bezonas fordoni mian Tony:n pro mono. Mi volas diri al Vi nur tion, Charley: Tiu, kiun ili nomas nun Sans-ear, iam estis tute alia ulo kiel hodiaŭ, plena je feliĉo kaj gajeco kiel la tago plena je lumo, kaj la maro plena je gutoj. Li estis juna bienestro kaj havis edzinon, pro kiu li estus oferinta mil vivojn, kaj infanon, kiu estus valorinta al li kiel dekmil vivoj. La edzinon li iam alportis hejmen sur sia ĉevalino, kiu nomiĝis Tony. Kaj kiam poste la

ĉevalino naskis ĉevalidon, sanan, viglan kaj ruzan, kiel estas kreaĵo nur malofte, kial ĝi ne povis esti ankaŭ nomata Tony, kiel ĝia patrino? Ĉu mi ne pravas, Charley?”

„Vi pravas“, mi respondis, kortuŝite per la infaneco de la sentimento, kiu parolis al mi nun tiel neekspektite.

„*Well!* Tiam venis tiuj dek, pri kiuj mi antaŭe parolis al Vi. Estis grupo de *bushheader*:oj, kiuj tiutempe malsekurigis la regionon. Ili bruligis mian bienon, mortigis mian edzinon kaj mian infanon, mortpafis mian ĉevalinon, kiu ne estis utile al ili, ĉar ĝi ne portis neniun fremdulon, kaj nur la ĉevalido travivis, ĉar ĝi estis erarmigranta. Mi revenis de ĉasado, kaj trovis la beston kiel la sola atestanto de mia perdita feliĉo. Kion mi rakontu al Vi plu! Ok el la fiuloj mortfalis, falis per mia mano, per la kugloj el tiu ĉi pafilo. La du aliaj ankaŭ estos miaj oferoj, ĉar kies spuron la maljuna Sans-ear eksekvas, tiu nur kuru, ĝis la mongoloj. Li ne povas fuĝi for de li. Ĵus tial mi volas iri malsupren al Texas kaj Meksikujo. El la juna, vigla bienestro estiĝis grizhara arbara kaj preria migranto, kiu celas nur al sango kaj venĝo, kaj la besto estiĝis kreaĵo, kiu plie similas al virkapro ol al bona ĉevalo. Sed brave ili ambaŭ estas ankoraŭ hodiaŭ, kaj ni ankaŭ teniĝos brave kune, ĝis susuros sago, fajfos kuglo aŭ malsuprenflugas tomahoko pro pretigi la finon de unu el ili. La alia — egale ĉu la ĉevalo aŭ la homo — tiam postekmortos per aflikto kaj sopiro.“

Sans-ear irigis sian manon trans la okuloj. Tiam li svingiĝis sur la ĉevalon, kaj diris:

„Tiom pri la malnovaj rakontoj, Charley. Vi estas la unua, al kiu mi parolis pri tio, kvankam mi nun vidas Vin la unuan fojon, kaj verŝajne Vi ankaŭ estos la lasta. Vi aŭdis pri mi, kaj oni ankaŭ rakontis pri Vi, kiam mi foje sentis la emon sidiĝi ĉe tiuj aŭ aliaj homoj ĉe la fajro kvaronan horon. Tial mi volis montri al Vi, ke mi ne supozas Vin esti fremdulo. Nun plu faru nur la komplezon al mi forgesi, ke mi hodiaŭ permesis min subigi de Vi! Mi provos prui al Vi, ke la maljuna Mark Jorrocks tamen estas ĉiutempe sur sia posteno.“

Mi demetis la katenojn de mia mustango, kaj same surĉevaliĝis. Jorrocks diris, ke ni volis rajdi suden, tamen li rekte rajdis okcidenten. Mi ne demandis lin pri tio. Certe li havis bone pripensitan planon. Ankaŭ mi ne eldiris unu vorton pri tio, ke li kunprenis la lancojn de la kvar indiandoj.

Ni estis certe jam pasintaj sufiĉan distancon, dum kio neniuj el ni diris unu vorton, kiam li haltigis sian ĉevalon. Li deseliĝis, kaj pike starigis unu el la lancoj sur la pinton de ondaĵo. Nun mi ekkonis lian intencon. Li volis starigi la lancojn kiel vojindikiloj, per kiuj la *indsman*:oj estu gvidataj al iliaj mortuloj, pro vidigi ilin, ke Sans-ear faligis kvar novajn oferojn.

Tiam li malfermis malnovan selpoŝon kaj elprenis ok dikajn ĉifonaĵojn, kiujn li disdonis al mi kaj si.

„Jen, Charley, deĉevaliĝu kaj involvu la hufojn de Via mustango! Sur tiu speco de tero la hufoj tiel lasos tute neniun spuron, kaj la *redman*:oj pensos, ke ni forflugis tra la aero. Nun rajdu rekte suden, ĝis Vi atingas la fervojon, kie Vi atendu min! Mi enterigos ankaŭ la tri aliajn lancojn kaj tiam ekzemple sekvos Vin. Ni renkontos tutcerte, kaj se ni tamen eraros pri eta distanco, la krio de vulturo dum la tago kaj la hurlo de kojoto dum la nokto estu nia signo.“

Kvin minutojn poste ni ne vidis la alian plu. Mi rajdis, sinkiĝinte en profundan pripenson, al la interkonsentigita direkto. La hufkovraĵoj malhelpis al mia ĉevalo kuri rapide. Tial mi deseliĝis, kiam mi estis pasinta eble kvin anglajn mejlojn, kaj deprenis la ĉifonaĵojn. Ili ja estis nur rimedo nevidebligi niajn spurojn en la proksimo de la lancindikiloj.

Nun la mustango repovis kuri senĝene. La prerio pli kaj pli ebeniĝis, kaj tie kaj tie aperis malgranda nukso aŭ sovaĝaĉeriza ujo, kaj ankoraŭ la suno estis iomete super la okcidenta ĉielrando, kiam mi rimarkis lineon en la sudo, kiu iĝis preskaŭ ekzakte de okcidento al sudo.

Ĉu tio do estis la menciita fervojo? Tutcerte. Mi rajdis al ĝi, kaj mia supozo estis pravigata. La fervojo, kies reloj iris sur preskaŭ homalta taluso, estis antaŭ mi.

Stranga sento ekregis min, ja neklara, sed komprenebla. Tie ĉi mi iĝis ekde longa tempo refoje en kontakto kun la civilizacio. Je alveno de trajno mi bezonis nur fari mansignon, pro povi entrajniĝi kaj vapore forveturi okcidenten aŭ orienten. Sed tio penso ne estiĝis allogo al mi. Tiel ege la ĉarmo de la prerio tenis min.

Post mi estis fiksliginta mian ĉevalon per la lazo, mi serĉis sekajn branĉojn sub la arbedoj pro resteja fajro. Unu el la arbedoj staris dense al la bazo de la taluso. Mi kliniĝis pro kolekti kelkajn branĉojn, kaj ekrimarkis, je mia miro, martelon, kiu tie kuŝis sur la tero. Ĝi tutcerte estis tie nur dum mallonga tempo, ĉar ĝia batareo estis brile glate, do uzinte nur mallongan tempon antaŭe, kaj nek ĝiaj flankoj nek ĝia dika nek ĝia maldika flanko surhavis eĉ ne nuancon da rusto, kiu certe estus ekaperinta, se ĝi estus kuŝinta tie nur kelkajn tagojn en la humideco de la nokta roso. Hodiaŭ aŭ maksimume hieraŭ homoj tutcerte estis estintaj tie.

Unue mi esploris la flankon de la taluso antaŭ mi, sed ne trovis ion eminentan. Tiam mi transgrimis, kaj denove longan tempon vane serĉis. Sed finfine mi rimarkis densan aron da bonodoranta, mallonge bukla bubala herbo, kiu eminentiĝis al mi kiel maloftaĵo je tiu loko. Mi rigardis ĝin pli detale, kaj faris surprizan ekkonon. Vere, piedo estis starinta sur ĝi! La spuro ankoraŭ estis nova, maksimume farita du horojn antaŭe. La tigoj, kiuj nur estis kurbigitaj de la planda rando jam estis releviĝintaj, dum la parto de la aro, kiu estis premita malsupren de la interna plandareo, ankoraŭ indikis la larĝecon de la kalkano kaj de la piedfingroj. La premsigno estis farita de indiana *mokassin*. Ĉu do indianoj estis en la proksimo? Al kiu rilato oni do povis ligi ilin al la martelo? Ĉu ne ankaŭ blankuloj surhavis indianaj mokasenojn, kaj ĉu ne eblis, ke laŭ la reloj iranta *railroader* uzis tian specon de komfortaj piedkovriloj? Ĝi povis esti ajn kiel ĝi volis, mi devis ne provi trankviligi min per nura supozo. La ĉefaĵo tie ĉi estis certiĝo.

Sed mi ankaŭ devis diri al mi, ke la esplorado de la fervojo estis elstare danĝere. Je ambaŭ flankoj de la rela taluso malamiko povis atendi malantaŭ ĉiu arbedo, kaj sur la taluso mem mi estis facile rimarkebla jam de longa distanco. En aliaj cirkonstancoj mi estus sentinta nur malmultan maltrankvilon pro la martelo, kaj senhezite komencinta la esploron. Sed nun, kiam mi sciis, ke la ogelaloj estis en la proksimo, eĉ dum la plej eta ago necesis la plej ega gardiĝo. Mi surdorsigis la pafilojn, kaj prenis la revolveron en la manon. Kaŝirante de arbedo al arbedo mi serĉis distancon antaŭen — sen sukceso!

Do mi reeniris al la komenca punkto de mia esplorado. Tiu serĉiro estis estinta okzidenten de la loko, kie paŝtiĝis mia ĉevalo. Mi nun daŭrigis ĝin orienten, komence per la sama malsukceso. Nun mi volis gardiĝe iri trans la taluso. Rampante sur manoj kaj piedoj, mi moviĝis laŭlarĝe trans la reloj. Tiam mi ekrimarkis, ke tie ĉi la ŝtonaro de la taluso estis cirkloforme freŝe surmetita. Tiel ja la *railroader*-oj ne laboris je plibonigoj. Mi fositis per la fingroj, kaj ektimiĝis. Mia mano estis ekestiĝinta sangoruĝe, kaj ankaŭ la ŝtonaro estis ruĝe kaj malseke. Mi esploris la aferon, nun kun la korpo dense kuŝante sur la teron, kaj mi devis ekscii, ke oni estis ŝutinta ŝtonaron sur grandan, profundan sangoflakon.

Tie ĉi estis okazinta murdo. Tiom certis. Oni ja estis provinta kaŝi la sangon de besto tiamaniere. Sed nun estis la demando: kiu estis la murdito, kaj kiu la murdinto? Spuro ne videblis tie supre, ĉar la tero ne povis esti enpremita pro ĝia malmoleco. Sed kiam mi vidis al la bazo surkreskita de bubala herbo, mi rimarkis plurajn piedajn premsignojn, kaj ankaŭ du kontinuajn premaĵojn, kvazaŭ oni tie ĉi prenis homon, kies piedoj postfrotumis, je la supra korpo, kaj tiris lin malsupren laŭ la taluso.

Estis danĝere transiri je tiu loko. La spuroj estis freŝaj, tiel ke la supozita murdo estis farita nur mallonge antaŭe, do la murdistoj eble ankoraŭ estis en la proksimo. Mi tial rerampis malsupren je la ĉi tiea flanko kaj iris sufiĉan distancon okzidenten, tie trans la taluso, kaj nur nun mi kaŝiris orienten sur la alia flanko.

Tio okazis nur tre malrapide, ĉar mi agu per ĉia ruzeco kaj gardiĝo, pro resti nerimarkite, en la kazo de danĝero en la proksimo. Feliĉe la arbedoj staris pli dense unu al la alia, kaj nun mi ja plej prizorge devis kaŝiĝi malantaŭ ĉiu arbedo kaj unue rigardi plej akre tra la neksta arbedo, antaŭ mi povis riski transsalti, aŭ serpentece rampi sur la tero tra la interspaco, tiel mi sukcesis senokaze atingi la lokon malsupre de tie, kie mi antaŭe estis trovinta la sangon sur la taluso.

Densa arbedaro estis vidalvide al la sovaĝa ĉerizujo, en kiu mi kuŝis rigardante, apartigite de ĝi de ok metrojn vasta interspaco. Tiel ege la ĉerizarbedo malebligis klaran elvidon, kaj tiel ege ja ankaŭ la arbedaro je la alia flanko densis, kvankam ŝajnis al mi, kvazaŭ io simila al homa korpo kuŝis sub ĝi. La aĵo eble estis kovrita, sed ĝi formiĝis malhelan amason, kiu apartiĝis de la ĉirkaŭo, kaj ĝi havis la longecon de homo. Ĉu tie eble la murdito estis kaŝita? Same povus esti unu el la murdintoj. Mi devis provi klarigi tion.

Gardiĝe mi prenis branĉon, kiu kuŝis tie, metis mian ĉapelon sur ĝin kaj ŝovis ĝin, intence kaŭzinte etan brueton, tra la ĉerizbranĉaro, kvazaŭ iu tie ĉi provus trairi. Transe nenio moviĝis. Aŭ neniu malamiko tieis, aŭ tie estis iu, kiu estis tro ruze aŭ tro sperte lasi sin erarigi per tia finto.

Tial mi do decidis riski ĉion. Mi reenrampis kaj ekkuris. Per malmultaj paŝegoj mi estis trainta la liberan spacon, kaj saltinta en la densan arbedon, tenante la tranĉilon prete pro ekpuŝi. Sub derompitaj branĉoj kuŝis homo; tion mi tuj sentis, sed li ne vivis plu. Mi levis la branĉojn supren kaj ekvidis vizaĝon, terurige misformita de ekmortaj spasmoj kaj kun sangoruĝa kranio. Estis blankulo. Li estis skalpita kaj tute senvestigita. En la dorso estis, kiel mi rimarkis dum ekzameno de la korpo, kontraŭhoka pinto de

disrompiĝinta sago. Tiu do estis ofero de indianoj, kiuj iris sur la milita vojo. Tion supozigis la kontraŭhoko al mi.

Ĉu la ruĝuloj estis foririntaj, aŭ ĉu ili ankoraŭ troviĝis en la proksimo? Tion mi devis scii. Ilia spuro estis klare videbla de tie ĉi. Ĝi iris de la reltalo sur la prerion. Mi sekvis ĝin, ĉiam prete ricevi sagon aŭ devi ekuzi mian tranĉilon, de arbedo al arbedo. Estis estintaj kvar viroj, du pli maljunaj kaj du junuloj, kiel mi povis konkludi per la grandeco de la piedpemaĵoj. Dum mi moviĝis nur sur la fingraj kaj piedaj pintoj — tasko, kiu postulas amason da sperto kaj ne malsufiĉan forton — ili eĉ ne estis provintaj kaŝigi ilian spuron, do certe ili sentis sin esti tute sekure tie.

La vento blovis de sudoriento, do kontraŭ mi. Tial mi ne terurigiĝis eminente, kiam mi aŭdis la spiregon de ĉevalo. Ĝi ja ne estis povinta flari min. Mi rampis plu kaj troviĝis finfine je la celo, aŭ almenaŭ rimarkis sufiĉe pro povi reeniri. Fakte mi vidis antaŭ mi, inter la arbedoj, ĉirkaŭ sesdek ĉevalojn, ĉiuj, escepte de du, kun indianaj jungilaroj. Oni demetis iliajn selojn, certe pro uzi ilin je la proksima restejo kiel seĝoj aŭ subkapaĵoj. Ĉe la ĉevaloj nur du viroj staris gardante. Unu el ili, ankoraŭ juna homo, surhavis paro da krudaj, bovledaj botoj, tutcerte la posedaĵo de la murdito, kies vestaĵoj kaj kunportaĵoj estis disdonitaj inter la murdintoj. La postenuloj do apartenis al la kvar, kies spuro estis kondukinta min tien.

La indiano ofte negocas kun blankuloj, kiuj ne komprenas lian lingvon. Per tiu kaŭzo evoluigiĝis inter la ruĝaj viroj kaj la palvizaĝoj gestolingvo, kies signojn ajn ĉiu devas kompreni, kiu iras en la Sovaĝan Okzideton. Je vigla karaktero aŭ ekscitigaj okazoj tiam ofte okaziĝas, ke iu akompanigas la parolan esprimmanieron per gestoj, kiuj havas la saman signifon kiel la vortoj. La du gardistoj interparolis, kaj la temo de ilia interparolado ŝajne ege ekscitis ilin, ĉar ili kondukis en maniero, pro kiu tutcerte pli maljunaj militistoj estus riproĉintaj ilin. Ili montris okzidenten, faris la gestojn de fajro, de ĉevalo, do de la lokomotivo, kiu ja estas nomata ‚fajroĉevalo‘ de la indianoj, ili batis iliajn arkojn sur la teron, kvazaŭ ili volis haki aŭ forĝi feron, celis kvazaŭ dum pafado kaj faris la movojn de pikado kaj tomahoksvingado. Mi estis vidinta sufiĉe, kaj tuj reeniris, dum kio mi forviŝis mian spuron laŭeble bone.

Tial daŭris longan tempon, ĝis mi reatingis mian ĉevalon. Intertempe ĝi estis trovinta akompanulon, ĉar flanke de ĝi paŝtiĝis la ĉevalino de Mark, kiu mem komforte kuŝis malantaŭ arbedo, kaj mordis grandan pecon da sekigita viando.

„Kiom ili estas, Charley?“ li demandis min.

„Kiu?“

„*Indsman*:oj.“

„Kio pensigis Vin tion?“

„La olda Sans-ear do ŝajnas esti al Vi tia *greenborn*, kiel Vi al li antaŭtempe, ĉu? Sed tiukaze Vi ege eraras, hihihih!“

Estis la duonlaŭta, memcerta rido, kiun mi jam unu fojon antaŭe estis aŭdinta de li, kaj kiun li ŝajne nur aŭdigis, kiam li certis esti supera al iu. Tiu kutimo de mia nova kunulo cetere memorigis min pri Sam Hawkens, kiu ridis preskaŭ same.

„Al kio Vi celas, Mark?“ mi scivolis.

„Ĉu mi vere devas elparoli tion, Charley? Kion Vi do estus farinta, se Vi estus alveninta tie ĉi kaj trovinta tiun martelon ĉe la ĉevalon, sed ne Vian kunulon?“

„Mi estus atendinta, ĝis li revenas.“

„Ĉu? Tion mi ekzemple ne volas tuj kredi. Vi mankis, kiam mi venis. Eble ja io okazis al Vi, do mi iris post Vi.“

„Sed mi sameble povus esti intencinta ion, kiu estus malebligita per Via ĉeesto. Krome mi pensas, ke Old Shatterhand ne agas ion, en kio li neglektas la necesan gardiĝon. Ĝis kie Vi sekvis min?“

„Unue tien, tiam tien, kaj finfine ĝis la bedaŭrinda viro, kiun la *indsman*:oj neigis. Mi povis esti pli rapide, ĉar mi ja sciis, ke Vi estis antaŭ mi. Kiam mi tiam vidis la mortulon, mi pensis, ke Vi nur estis esploranta, kaj mi revenis tien ĉi, kie mi ekzemple trankvile atendis Vin. Nu, kiom ili estas?“

„Sesdek eble.“

„Vidu! Do certe la trupo, kies spuron mi jam rimarkis hieraŭ. Ĉu sur la milita vojo?“

„Jes.“

„Mallonga resto, ĉu?“

„Ili demetis la selojn.“

„Fulmo! Do ili planas fari ion tie ĉirkaŭe! Ĉu Vi ne vidis ion?“

„Ŝajnas al mi, kvazaŭ ili volas disŝiri la relojn, tiel ke la trajno dereliĝas, kaj ke ili tiam povos elrabi ĝin.“

„Ĉu Vi diras la veron, Charley? Tio ja estus eminente danĝera aĵo al la *railroader*:oj kune kun iliaj veturgastoj! De kie Vi scias tion?“

„Mi kaŝaŭskultis la ruĝulojn.“

„Do Vi komprenas la dialekton de la ogelaloj?“

„Jes. Sed tio tute ne necesis, ĉar la ĉevalgardistoj, en kies proksimon mi iĝis, interparolis per klare videblaj gestoj.“

„Tio ja foje erarigas. Do priskribu al mi la gestojn, kiujn ili faris!“

Mi faris tion. La malgranda viro salte ekstaris, sed reregis sin kaj residiĝis.

„Tiukaze Vi komprenis ilin ĝuste, kaj ni helpu al la trajno. Sed ni ekzemple ne troe hastu, ĉar tiuj aĵoj devas esti pripensitaj kaj interkonsilitaj trankvile. Nu, sesdek, ĉu? Hm, ne estas spaco sur mia pafilo por sesdek entranĉaĵoj plu. Kien mi faru ilin poste?“

Malgraŭ la serioza situacio mi estis preskaŭ laŭte ridinta. La malgranda vireto havis sesdek indianojn antaŭ si, sed anstataŭ timi antaŭ ilia superforto, li nur zorgis pri la spaco por siaj entranĉaĵoj.

„Kiom Vi do volas neigi?“ mi demandis lin.

„Tion mi ekzemple ne jam scias mem. Sed m'pensas maksimume du aŭ tri, ĉar ili forkuros, kiam ili rimarkos dudek aŭ tridek blankulojn.“

Mark do ankaŭ enkalkulis la penson, kiun mi ankaŭ silente estis farinta, ke ni devis esti plifortigataj per la fervojanaro kaj la pasaĝeroj.

„La ĉefa aĵo estas“, mi komentis, „ke ni fakte konu la trajnon, kiun ili volas ataki. Estus tre malgajige, se ni irus en la malĝustan direkton.“

„Laŭ iliaj gestoj ili parolis pri la *mountain*-trajno, kiu venos de la okcidento, kaj tio

mirigas min. La orienta trajno certe kunhavas pli da varoj aŭ aĵoj, kiuj povas esti utilaj al la *indsman*:oj, pli ol tiu. Do fakte ne restos io plu al ni, ni disiĝu. Unu iru okcidenten, la alia orienten.“

„Ni certe estas devigita fari tion, se ni ne sukcesas ricevi certecon. Jes, se ni nur scius, kie kaj kiam la trajnoj iras!“

„Kio povas scii tion! Dum ĉiuj tagoj de mia vivo mi ne jam estis en unu el tiaj aĵoj, kiujn ili nomas vagono, en kiu oni ne scias per timo kien meti siajn krurojn. Mi do laŭdu la prerion kaj mian Tony:n! — Vi do ne trovis la indianojn jam laborante, ĉu?“

„Ne. Entute mi nur vidis la ĉevalojn. Sed per ĉio estis diveneble, ke ili scias, kiam la trajno venos, kaj verŝajne ili ne ekagos antaŭ la nokto. Estas maksimume unu horo plu ĝis la krepusko. Tiam ni kaŝiru al ili pro ekscii, kion ni ne jam scias.“

„*Well*, tiel ĝi estu!“

„Sed tiam necesos, ke unu el ni iras tie ĉi sur la taluson. Ja eblas, ke la ruĝuloj ekhavas la ideon proksimiĝi de la alia flanko. Almenaŭ mi pensas, ke ili disŝiros la relojn, ĉar ili ja devas pretigi la atakejon inter ili kaj la trajno.“

„Prave. Sed la postenado tie supre ne necesas, Charley. Jen vidu al la Tony! Mi alligos ĝin aŭ metas katenojn sur ĝiajn krurojn. Ĝi estas elstare ruza besto, kaj havas nazon, pri kiu mi povas fidi. Ĉu Vi jam estis vidinta ĉevalon, kiu ne spiregas, kiam ĝi flaras malamikon?“

„Ne.“

„Nu, ankaŭ estas nur unu sola, kaj tiu estas la Tony. La spirego ja avertas la estron de la ĉevalo, sed ĝi malkaŝas ankaŭ du aĵojn, fakte unue, kie la besto kaj la viro troviĝas, kaj due, ke la viro estas avertita. Tial mi dekutimigis mian Tony:n fari tion, kaj la malstulta sinjorino besto laŭŝajne komprenis min. Mi ĉiam lasas ĝin paŝtiĝi libere, kaj tuj kiam ĝi flaras danĝeron, ĝi venas al mi kaj puŝetas sian buŝon sur min.“

„Sed kio, se ĝi ne rimarkos la malamikon ĵus hodiaŭ?“

„*Pshaw!* La vento venas de la *indsman*:oj, kaj mi tuj lasos min mortpafi de Vi, se la Tony ne anoncos ĉiun ruĝhaŭtulon je distanco de mil paŝoj. Cetere tiuj uloj havas okulojn kiel agloj, kaj eĉ se Vi kuŝiĝas laŭlonge sur la taluson, ankoraŭ eblas, ke ili rimarkos Vin el mallonga distanco. Do nur trankvile restu tie ĉi, Charley!“

„Vi pravas, kaj mi volas fidi pri la Tony same kiel Vi. Mi ne konas ĝin tiel longe, sed mi jam preskaŭ havas la konvinkon, ke oni povas fidi pri ĝi.“

Mi denove elpoŝiĝis unu el miaj ‚memfaritaj‘ cigaroj, kaj bruligis ĝin. Mark ŝire malfermis la malgrandajn okulojn kaj la buŝon laŭeble dise. Liaj nazloboj vastiĝis kaj avide ensuĉis la odoron de la herbo, dum hela ekĝojo deformigis siajn trajtojn. La okcidentulo ne ofte iĝas en la situacion gustumi bonan tabakon, sed tamen estas pasie sindoninta al la fumado.

„*O wonderful!* Charley! Vi havas cigarojn, ĉu?“

„Memkompreneble. Ĉu Vi volas havi unu?“

„Donu ĝin! Vi estas ulo, pri kiu oni devas havi tutan kalabasan korbon plene je respekto!“

Li bruligis sian cigaron per mia, glutis la fumon en la indiana maniero, kaj tiam

reelpuŝis ĝin de la stomako. Dum tio lia vizaĝo videbligis ravon, kvazaŭ li estus suprenlevita en la sepan ĉielon de Mohamedo.

„*Hang it all*, kia plezuro tio estas! Ĉu mi divenu, kia speco ĝi estas, Charley?“

„Divenu! Ĉu Vi estas spertulo?“

„Ho jes!“

„Ĉu?“

„*Goosefoot* el Virginio aŭ Marilando!“

„Ne!“

„Kio? Tiukaze mi eraras la unuan fojon. Estas *goosefoot*, ĉar tiun odoron kaj tiun guston mi konas!“

„Estas ne.“

„Do certe estas brazila *legitimo*!“

„Ankaŭ ne.“

„Ĉu *curaçao* de Bahia?“

„Denove ne.“

„Nu, kio alie?“

„Vidu al la cigaro!“

Mi elpoŝigis kroman, disturnis ĝin kaj tiam donis al li la volvofolion kaj la enhavon.

„Ĉu Vi frenezas, Charley, ke Vi damaĝas tian cigaron! Ĉiu kaptilisto cirkonstace, fakte kiam li ne estis fuminta longan tempon, certe donus unu aŭ du kastorajn felojn pro tiu al Vi!“

„Mi ricevos novajn du aŭ tri tagojn poste.“

„Ĉu tri tagojn? — Ĉu novajn? — Nu de kie?“

„De mia fabriko.“

„Kio? Vi havas cigarofabrikon, ĉu?“

„Jes.“

„Nu kie?“

„Tie!“

Mi montris al mia mustango.

„Charley, mi petas Vin, faru nur ŝercon, kiam ĝi ekzemple taŭgas.“

„Ne estas ŝerco, sed la vero.“

„Hm! Se Vi ne estus Old Shatterhand, mi vere pensus, ke io en Via kapo estas tro multe aŭ tro malmulte.“

„Nur vidu al la tabako!“

Jorrocks faris tion detale.

„Mi ne konas ĝin. Sed ĝi bonas, elstare bonas.“

„Do mi montros mian fabrikon al Vi.“

Mi iris al mia mustango, lozigis la selon, kaj eltiris malgrandan kusenon, kiun mi malfermis.

„Jen, enmetu Vian manon!“

Mark eltiris kelkajn foliojn.

„Charley, ne mistifiku min. Tiuj ja estas nur ĉerizujaj kaj lentiskaj folioj!“

„Ĝustel! Iom da sovaĝa kanabo ankaŭ enestas, kaj la volvofolio tie estas nenio, sed speco de ankuzo, kiun oni nomas tie ĉi *verbally*. Tiu kuseno vere estas mia tabakfabriko. Ajn kiam mi trovas bonajn foliojn de tiuj specoj, mi metas ilin en la kusenon, kaj tiun sub la selon. Evoluigas varmo kaj la folioj fermentas — jen Vi vidas mian arton!“

„Nekredeble!“

„Sed vere! Tia cigaro sed ja estas nur sufiĉe mizera anstataŭaĵo, kaj transe en la okcidento ĉiu nespertulo, kies palato estas sensema kiel bubala ledο, farus maksimume unu ensuĉon, kaj tiam forĵetus ĝin. Sed ĉirkaŭmigru jarlonge sur la savano, kaj tiam fumu tian aĵon, kaj la ankuzaj folioj ŝajnos al Vi kiel la plej bona *goosefoot*. Vi ja ĝin vidas per Via propra ekzemplo.“

„Charley, Vi altrangiĝas en mia respekto!“

„Sed nur ne elparolu tion, kiam Vi sidas ĉe homoj, kiuj ne jam estis en la okcidento! Alikaze oni pensus Vin esti Tunguso, Kirgizo aŭ Ĥanto, kiu frotis siajn gustajn kaj flarajn ilojn per gudro, aŭ gluigis ilin per rezino!“

„Tunguso aŭ Ĥanto, tute egalas al mi, se nur la cigaro bongustas. Cetere mi ne scias, kie oni povas trovi tiujn specojn de homoj.“

Li tute ne lasis sin ĝeni per mia malkovro de mia fabrika sekreto, sed fumis la cigaron ĝis ĝi estis ankoraŭ nur peceto, kiu estis tiel malgranda, ke li preskaŭ ne plu povis teni ĝin inter la lipoj.

Intertempe la suno estis malleviĝinta. La krepusko estis komencinta, kaj estiĝis tiel malhele, ke ni nun povis ekagi laŭ nia plano.

„Ĉu nun?“ Mark demandis.

„Mi pretas.“

„Nu kiel?“

„Ni kune iros ĝis la ĉevaloj de la ruĝuloj. Tiam ni disiĝos, kaŝiros al ilia restejo, kaj tiam renkontiĝos tie ĉi.“

„Bone! Kaj se io okaziĝos, kio devigos nin fuĝi, dum kiu ni eble perdiĝos, ni kuniros ĉe la akvo de tie ĉi rekte en la sudo. Praarbaro, kiu malleviĝas de la montoj, tie elmetas sian lastan pinton for sur la prerion. Du mejlojn de tiu pinto, je la suda rando de la arbaro, estas preria golfeto, kie unu povas facile trovi la alian.“

„Bone! Do antaŭen!“

Mi ne supozis ĝin esti verŝajne, ke ni estus disigotaj, sed estis postulo de la gardiĝo certiĝi pri ĉiaj cirkonstancoj.